# TAMEN PLU!

**OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO - AŬGUSTO 2005 / JARKOLEKTO 24**

*Redaktado: Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park SA 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

**Bonestu ne forgesi de tempo al tempo atente rigardi tiun ate de Paŭlo konstante ĝisdatigatan ligilon al la 21a Somerkursaro de AEA: www.thebegavalley.com/1468.0.html**

"Sinjoro, ĉu vi bonestus aĉeti lotilon? Vi povas gajni novan aŭtomobilon!"

"Mi ne volas havi iun ajn aŭtomobilon!"

"Tamen aĉetu lotilon! Estas 20.000 lotiloj, kial ĝuste vi gajnu?"

## Edukado

Se vi vere volas lerni kiel senerare uzi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".

La ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitatas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.

"Ĉu mi rajtas edziĝi al via filino?"

"Estus pli bone, se vi unue demandus mian edzinon."

"Nu, bone, sed mi preferas vian filinon!"

## Gravaj Esperanto-eventoj

De dimanĉo la 31a de julio ĝis dimanĉo la 7a de aŭgusto 2005 okazos la 61a Internacia Junularkongreso en Zakopane, Polujo.

Sabaton la 13an de aŭgusto, nur por amuziĝi per kantado ktp., ni renkontiĝos ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012, je la 16a horo. Indrani kuiros por ni ĉiuj sian faman vegetaran supon, sed tamen ankaŭ ni rajtos kontribui al la komuna manĝado. Ĉiuj bonvenos!

Merkredon la 7an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo, 72-74 East Avenue, Clarence Park, ĉe la angulo de East Avenue kaj Canterbury Terrace, Black Forest, 5035, tuj apud la stacidomo, Clarence Park.

Merkredon la 21an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo, 72-74 Orienta Avenuo, Parko Clarence, ĉe la angulo de Orienta Avenuo kaj Canterbury Teraso, Nigra Arbaro, 5035, tuj apud la stacidomo, Parko Clarence.

Sabaton la 24an de septembro ni okazigos ekskurson al Haveno Viktoro. Detaloj sekvos!

Sabaton la 22an de oktobro ni renkontiĝos je la 12a horo en la Komunuma Ĝardeno de Gloria en Wynn Vale.

Dimanĉon la 13an de novembro ni renkontiĝos ĉe Sandor kaj Helena  por Amuzaĵoj kaj Ludoj.

La 7an de decembro ni festos la 146an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la bone, eĉ bonege konata komunumejo en Parko Clarence, la antaŭurbo kun multaj esperantistoj.

Ĝuu 13 tagojn da intensa studado de la internacia lingvo, Esperanto, dum la 21a Somerkursaro/kongreso de AEA. Travivu amikajn aktivecojn kaj Esperanto-kulturon plonĝante en la lingvon ekde la 15a ĝis la 27a de januaro 2006 en "Kianinny Cabins", Tathra Road, Tathra, NSK 2550, ĉe la sudorienta marbordo de Novsudkimrujo.

La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.

Bent kaj Børge ŝanceliĝis hejmen tre frue matene.

"Børge, ni diros al neniu, kie ni estis", balbutis Bent.

"Ne, ne", parolaĉis Børge, "sed al mi vi senriske povas tion rakonti!"

## Konsolo al tiuj el ni, kiuj ne iris al Eŭropo

Por ke tiuj el vi, kiuj nune ne estas for el la Aŭstralio, ne tro malĝoju, ŝia moŝtino, Indrani, bonkore invitas vin al sia belega hejmo sabaton la 13an de aŭgusto por diversaj malsamaj distradoj, al kiuj vi mem rajtas kontribui. Precipe ŝercoj, teatraĵetoj, kantetoj ktp. estos tre bonvenaj!

## Donacema esperantistino anonima

Malavare donacis al "Esperanto en Sudaŭstralio" plurajn dekojn da valoraj Esperanto-libroj. Ni elkore dankas al ŝi pro ŝia donacemo.

Aŭdiĝas teruraj sakroj de en la banĉambro.

"Kio en la mondo okazas?" demandas la edzino.

"Estas mia razilo", respondas la edzo, "ĝi ne povas ion ajn fortranĉi!"

"Sensensaĵo. Ne provu kredigi al mi, ke via barbo estas pli malmola ol tiu korkplanko, kiun mi metis en la kuirejon hieraŭ!"

## Biografio de Audrey Felby

Audrey naskiĝis la 1an de novembro 1935 en Brixton, Londono, Britujo. Inter 1941 kaj 1951 ŝi vizitadis kelkajn lernejojn, kaj en Danujo ŝi frekventis kurson pri tajpado. Ŝi estas membro de "Esperanto en Sudaŭstralio" kaj de AEA.

La patro de Audrey, Charles Perrin, tre juna iĝis maristo kaj partoprenis en la unua mondmilito. Poste li laboris kiel leterportisto. La patrino de Audrey nomiĝis Winifred Barbara. Audrey havas unu fratinon – Joan.

En Londono en 1956 ŝi konatiĝis kun Bob Felby, de kie ŝi ne nur komencis lerni Esperanton, sed al kiu ŝi ankaŭ edziniĝis (en Danujo). Ili vivis kelkajn jarojn en Britujo, kelkajn en Danujo kaj de 1974 en Aŭstralio. Audrey kaj Bob havas tri gefilojn. La plej aĝa el ili, Mark, loĝas en Brisbano. Allan, la dua filo loĝas en Port Wakefield, kaj Linda, la plej juna el la gefratoj, loĝas en Salisbury. Audrey estas nun avino de 5 genepoj.

Krom sian denaskan anglan kaj krom Esperanton Audrey parolas iomete ankaŭ dane. Ŝia unua Esperanto-lernolibro nomiĝis *A Practical Course in Esperanto*.

Audrey vigle prenis parton en la Esperanto-vivo en Kopenhago kaj Frederikssund (Danujo), ĉeestis la danan kongreson en Roskilde, en 1968. En 1995 ŝi vojaĝis al UK en Tampereo (Suomujo), en 1997 ŝi helpis prepari la adelajdan UK-n. Ŝi kunpreparis la AEA-kongreson en 1982 en Adelajdo (la unua ekde 1911) kaj ĉiun lokan somerkursaron (laste la ĉijaran). Eblas, ke iam ŝi skribos kaj publikigos sian biografion.

***Kiajn profesiajn spertojn vi havas?***

De 1951 mi laboris dum du jaroj en magazeno (Civil Service Stores), kiu situis sur la Strando en Londono. Inter 1953 – 56 mi laboris kiel Statoficisto en la Ministerio pri Sano en Londono. De 1967 mi laboris dum unu jaro en medikamentfabriko (Løven) en Kopenhago, en 1970 en kopenhaga vernisfabriko, kaj en 1972 mia lasta laborejo en Danujo estis la ĉokoladfabriko (Toms).

Post la alveno al Aŭstralio mi laboris en kartonfabriko (Hardy's) ĝis 1981.

***Kiujn funkciojn vi plenumis en la Esperanto-movado?***

Mi estis la adelajda libroagento de AEA (1982 ĝis 1990). Por la loka societo mi estis unu jaron bibliotekistino kaj kelkajn jarojn mi estis estrarino en Adelajdo.

***Kiel vi memoras vian alvenon al Aŭstralio?***

Kiam ni eniris la landon, jam atendis nin en la flughaveno esperantistino, Thea van den Boogaard. Ŝi kun sia edzo kaj alia esperantisto, George Clarke, veturigis nin kaj montris al ni la belajn vidindaĵojn dum la unuaj tagoj de nia vivo ĉi tie. Dum tiu tempo la esperantistoj ne kunvenadis, sed Bob aktivigis ilin. En la komenco estis en la grupo nur George kaj Thea, sed post iom da tempo venis ankaŭ aliaj. Mi memoras Bert Onn kaj Beryl Randells.

***Ĉu vi havas krom Esperanton iun alian hobion?***

Antaŭe mi pentris iom, kudris kaj trikis. Mi ŝatis ankaŭ puzli, sed nun mi legas ĉiun tagon (anglalingvajn librojn), komputilumas kaj rigardas televidon.

***Kiuj estas viaj grandaj revoj, planoj?***

Mi nun estas kontenta, sed eble mi ŝatus vojaĝi.

*Katja Steele*

"Kvindek jarojn mi laboras por la sama estro!"

"Same ĉi tie, morgaŭ estos nia ora geedziĝa jubileo!"

# La 18a Lingva Esperanto-festivalo "Aroma Jalto"

***Informletero 1.***

Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraclokon en Ukrainujo, la krimean urbon, Jalto. Tie okazos la tradicia lingva Esperanto-festivalo "Aroma Jalto-2006". Belega ekzotika naturo, altaj montoj, senlima Nigra maro, flosantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj inspiros vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Krimeo ĉiam allogis multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj kaj pentristoj vizitis tiun ĉarman bordon de la duoninsulo por krei siajn ĉefverkojn. Venu kaj komprenu, kial Krimeo estas nepre vizitenda almenaŭ unu fojon en la vivo, des pli en la gastama kaj amika Esperanto-etoso.

Tempo: 29.04-09.05.2006.

Loko: Krimeo, fama kuracloko Jalto.

Programo: Seminarioj por Esperanto-instruantoj; lingvaj diversgradaj kursoj; universitato; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; KGS; ludoj...

Eventualaj prezoj – en Euroj: Loĝado:

en 2-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, € 7;

en 3-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, € 6;

en 4-litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo, € 5;
en 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, € 3.

Loĝado ne eblas sen nutrado.

Manĝado en la bazejo estas 3-foja, € 5.

Lingva ordo. Tradicie severa. Nulaj komencantoj ne akceptatos. Dum la registrado ĉiu partoprenonto memstare plenigos sian aliĝilon kaj respondos simplajn demandojn.

| Aliĝkotizoj en Euroj | ĝis 2006-3-1 | surloke |
|---|---|---|
| UkrEA-membroj | € 4 | € 6 |
| Ukrainujo | € 6 | € 10 |
| Ekssovetujo: | | |
| B-landoj | € 15 | € 20 |
| A-landoj | € 20 | € 30 |

Kontribuontoj al la programo, UkrEA-membroj ricevos rabaton laŭ interkonsento.

La organiza komitato:

- Volodimir Hordijenko, Kiev – ĉeforganizanto, loĝado, sportaj aranĝoj.
- Atilio Orellana Rojas, Den Haag – la seminario por Esperanto-instruantoj.
- Ana Montesinos, Londono – Seminario pri instrumaterialoj.
- Ole Pokotilo, Kiev – paroliga grupo, Verda polico.
- Anna Dubrovina, Kiev – komencanta grupo.
- Oleksandra Gricenok, Kiev – informtabulo, universitato.
- Katerina Semenova, Berdjansk – interkona vespero, KGS.
- Aleksandro Koval, Gomel – retpaĝo, koncertaj programoj.
- Jelena Snigirjova, Jalto – ekskursoj.
- Vjaĉeslav Katin, Jalto - – piedmarŝoj, lokaj zorgoj.
- Miĥail Ĵdanov, Jalto – ornamado, artaĵoj, lokaj zorgoj.

La aliĝkotizon bonestu sendi al Volodimir Hordijenko ĝis la 1a de marto 2006.

UA-01133, Kijiv-133, p.k..35

tel. (044) 285 17 01

Rete:volodimir_h@yahoo.com

http://www.aromajalta.by.ru

Aliĝintoj ricevos la 2an informleteron.

Vi ĉiuj scias kiel kuracistoj – kaj reĝoj, eble ankaŭ reĝinoj, almenaŭ reĝino Viktoria tion faris - ĉiam alparolas siajn malsanulojn per la persona pronomo, "ni", ĉu ne?

La kuraciston vizitas tre malvarmumiĝinta junulino.

"Ni devas trinki grandan tason da teo kun mielo kaj tuj kaj rapide enlitiĝi."

"Ĉu hejme ĉe mi aŭ ĉi tie?"

## Kabeoj

Reagoj indignaj kaj akuzoj pri perfido estis la respondo de multaj esperantistoj al la laŭta kabeo de 23-jara volontulo de TEJO, kiu nun akuzas la Esperanto-movadon pri subpremado de lingva diverseco. La plej fanatikaj diskutantoj postulas ideologian kontrolon de la dungitoj en la Centra Oficejo. La unua kabeinto verkis la unuan vortaron "Kion diris s-ro Kabe en 1931?" La ĉefrolulo, Sten Johansson decidis fondi Federacion Internacian de Kabe (FIK), aŭ Federacion de Esperantaj Kabeintoj (FEK). Legu pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org

"Ĉu avo malbonhumoriĝis, kiam la doganistoj senvestigis lin serĉante drogojn en la doganejo?"

"Tute ne, ili trovis liajn okulvitrojn, kiuj mankis al li dum semajnoj!"

## Joĉjo Kristiano Andersen

Danaj Esperanto-grupoj faris novan, grandan kaj gravan hejmpaĝon, nome: http://www.chifonoj.dk. La hejmpaĝo enhavas artikolojn pri la fama, dana fabelisto Hans Christian Andersen kaj tradukojn el liaj fabeloj. La hejmpaĝo salutas lian 200-jariĝon en 2005. La verkoj de H.C. Andersen internacias same kiel Esperanto, do tial ni montras ambaŭ flankojn!

"Ĉu vi povas melki kaj veturigi traktoron?" demandis bienposedanto la junulon serĉanta laboron.

"Mi povas almenaŭ veturigi ĝin, sed ĝis nun mi neniam provis melki ĝin!"

## Angligo de svedaj universitatoj

***Protestas Kiselman***

En "Dagens Nyheter", unu el la ĉefaj taggazetoj svedaj, aperis la 17an de junio tutpaĝa debatartikolo, subskribita interalie de Christer Kiselman, profesoro en Uppsala kaj membro de tri esperantlingvaj kaj unu sveda akademioj. La artikolo diras, ke svedlingvaj studantoj de natursciencoj ne plu povas diskuti, eĉ popularsciencnivele, siajn proprajn fakojn en sia propra lingvo, ĉar mankas sveda fakterminologio. La svedlingva artikolo legeblas ĉe http://www.dn.se/Dnet/jsp/polopoly.jsp

"Ĉu vi vere ricevis $10.000 kontraŭ via malnovega "Volvo?"

"Jes, tiom mi ricevis! Mi organizis loterion kun 1.000 lotiloj po $10!"

"Jes, sed ĉu neniu rimarkis, ke la malnova rubaĵo tute ne povis veturi?"

"Jes, la gajninto rimarkis tion, sed al li mi redonis la $10!"

## Nova melodio al "Ho, mia kor"

Antaŭ nelonge Neide Barros Rego komponis muzikon por la zamenhofa poemo "Ho, mia kor'". De nun tiu muzika versio, kantata de Neide mem, estas disponebla en la retpaĝaro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (http://www.kke.org.br). Interesitoj devas musumi sur la alternativon 'Muzikaro' de la Esperanta versio de la retpaĝaro kaj fari la elŝutadon de la muziko. Se plaĉus al iu gratuli al Neide, retmesaĝu al neidebarrosrego@terra.com.br.

Bonan aŭdadon!

